

# Kiam estiĝis ISAE?

*Wera BLANKE*

Dum KAEST [1] 2004 aperis la demando: Ĉu unue estis la ovo aŭ la kokino? Pli precize: Ĉu ISAE kreis Sciencan Revuon aŭ inverse? Kaj: Kiam estiĝis la revuo, respektive, kiam estis fondita Internacia Scienca Asocio Esperantista?

Sin apogante sur "Esperanto en Perspektivo" iuj opiniis, ke ĉi-lasta okazis en 1906. Sed aliaj protestis, citante la saman fonton, ke temas pri 1908. Eĉ "1907" fantomis tra la salono, eble por proponi kompromison. Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj havis opinion kaj fine per manlevado evidentiĝis, ke la plimulto pledas por "1906". Bone, ĉar ja en 2006 oni volis festi la centjariĝon.

Hejme mi konsultis ĉiujn disponeblajn fontojn pri tiuj tiklaj demandoj. Evidentiĝis, ke ili same ŝanceliĝas kiel la KAEST-anaro:

Scienca Revuo en 1957 [2] citas artikolon el „Esperanto" de septembro 1956:

> "JUBILEA KUNVENO DE I.S.A.E. Internacia Scienca Asocio Esperantista okazigis mardon matene en la salono *Zamenhof* specialan aranĝon por festi la 50-jaran jubileon de sia ekzisto".

Post priskribo de la festa programo sekvas informo, ke

> "I.S.A.E. eldonos, okaze de sia jubileo, verkon de ĉ. 250 grandformataj paĝoj. Ĝia provizora titolo estas 'Sciencaj Studoj'…".

Do, ek al tiu ĉi jubilea verko [3], kiun redaktis *Paul Neergaard* (kaj kiu pro "teknikaj malfacilaĵoj en la presejo" (p.6) aperis nur en 1958). En "Retrospektiva rigardo al 50 jaroj…" *Neergaard* skribas:

[1] Konferenco "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", serio de sciencteknikaj aranĝoj, kies tradicio originis en 1958. Ĉi-jare la aranĝo okazos en *Dobřichovice*, proksime de Prago, 10/12-11-2006. La prelegtekstoj aperadas ĉe eldonejo *Kava-Pech*.

[2] Scienca Revuo, Vol. 8 (1957)(3), p. 77



> "La 30-an de aŭgusto 1956, Internacia Scienca Asocio Esperantista plenigis sian 50-an jaron. La fondiĝo okazis dum la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo."

Sed al tio li aldonas piednoton:

> "Formale la ascocio fondiĝis dum la 3-a Universala Kongreso en Cambridge 1907, sed ĉiam oni rigardas la fondan kunsidon en Ĝenevo kiel tiun de la reala fondiĝo."

"Esperanto en Perspektivo" [4] sufiĉe ofte mencias I.S.A.E., sed estas nur du lokoj kiuj donas ion por nia temo. Sur paĝo 250 legeblas:

> "Dum la UK en Ĝenevo (1906) okazis kunsido de Esperantaj sciencistoj. Ĝin prezidis Generalo *Sébert* kaj ĝin sekretariis prof. *Carlo Bourlet*. Oni decidis subteni la enkondukon de Esperanto en la sciencon kaj la eldonon de Scienca Revuo (kiu aperis ĉe *Hachette* jam ekde 1903, sub la redakto de *P. Fruictier*). Fine, en 1908 estis fondita ISAE: ĝia oficiala organo iĝis Scienca Revuo."

Kaj sur paĝo 512:

> "ISAE estis fondita la 30-an de aŭgusto 1906 en Ĝenevo, dum la 2-a Universala Kongreso. … La grundo estis preparata dum du jaroj, per eldonado de Internacia Scienca Revuo, de kiu – ĝis la unua mondmilito – aperis ok grandformataj volumoj, kun entute preskaŭ 4000 paĝoj."

La sekva fonto estas "Enciklopedio de Esperanto" [5]. Sub "ISAE" (p. 252) ĝi referencas al "Scienco". Sed tiu ĉi kapvorto ne aperas, nek "Scienca Revuo". Tamen sub "Scienco kaj tekniko" mi trovis (sur p. 484):

> "En la UK de 1906, en Ĝenevo, kunsidis la sciencamantoj, kiuj elektis prezidanto *Sébert* kaj sekretario *Carlo Bourlet*. Oni decidis proponi al la scienculoj konstantan uzon de E en iliaj int. kongresoj; peti ke la sciencaj revuoj akceptu artikolojn en E redaktitajn aŭ aldonu E-resumon de la artikoloj, redaktitaj en nacia lingvo; fine oni decidis subteni la Sciencan Revuon, kiu estis publikigata jam de 1903 en Paris, ĉe la firmo *Hachette*, kaj redaktita de *Paul Fruictier*.

[3] "Sciencaj Studoj, bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj, eldonita okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista", sub redakto de Prof. *Paul Neergaard*, Kopenhago 1958, p. 9.

[4] *Lapenna, Ivo / Lins, Ulrich / Carlevaro, Tazio* (1974): Esperanto en Perspektivo, Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo. *London-Rotterdam*: UEA / CED.

[5] *Ŝirjaev, Ivan / Kökény, Lájos / Bleier V(ilmos)* (red.) (1979): Enciklopedio de Esperanto. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio (Represo de la unua eldono 1933).

> En 1908 estas fondita Int. Scienca Asocio E-ista (ISAE) sub prezido de *Sébert*, kaj kies oficiala organo estis la Scienca Revuo."

Kaj fine mi ĵetis rigardon en la aktualan Jarlibron de UEA (2005). Sub "Fakaj Asocioj" mi legis sur p. 75:

> "Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE; fond. 1907, aliĝinta al UEA… ). …" [6]

Nun mia scivolemo estis definitive vekita: Scienca Revuo – ĉu 1903 aŭ 1904? ISAE – ĉu 1906, 1907, 1908?

Kiam en januaro 2006 mi havis okazon, viziti la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo, mi konsultis la plej fidindan fonton pri tiuj gravaj demandoj, nome la unuajn kajerojn de „Internacia Scienca Revuo" [7].

Kun batanta koro kaj tremantaj manoj mi turnis la kadukajn foliojn, kiuj minacis disfali inter miaj fingroj. Malbonkonscience mi eĉ aŭdacis kopii iun aŭ alian paĝon, esperante unuflanke, ke baldaŭ aperos iu savanto por konservi per modernaj rimedoj tiujn niajn historiajn valoraĵojn, kaj aliflanke fierante pri la bonŝanco de ĉasanto, ke mi povos eltrovi la veran veron pri la naskiĝo de ISAE kaj ĝia revuo – respektive inverse.

Jen rigardu mem la unuan paĝon de la unua numero de "INTERNACIA SCIENCA REVUO" (ISR)[8] (vd. paĝon 4):

Tiu ĉi kovrilpaĝo do informas, ke en Januaro 1904 aperis la "No 1a" de la "1a Jaro". Per tio nia unua demando estas respondita. Sed ni kaptu la okazon, kaj iom pli detale rigardu la unuan kajeron de la "Monata Organo en Esperanto". Ĝi estas

> "Eldonata kun alta patronado de Doktoro *L. L. Zamenhof*, aŭtoro de la lingvo Esperanto; La Franca Societo de Fiziko; La Internacia Societo de Elektristoj; Profesoroj *Adelsköld, Appell, D'Arsonval, Baudoin de Courtenay, Bequerel, Berthelot, Bouchard, Deslandres, Duclaux, Förster, Haller, Henriko Poincaré, Ramsay,* Generalo *Sébert*: kaj diverslandaj scienculoj".

Ankaŭ indikitaj estas la "Redakcio: *P.Fruictier*", la "Administracio: *Hachette & Ko*" kaj la reprezentantoj en ok landoj: Anglujo,

---

[6] La UEA-Jarlibro de 2006 tamen asertas samloke, ke la fondojaro de I.S.A.E. estis 1906!

[7] Ĉi-loke mi ŝatus danki aparte al s-ro *Rob Moerbeek*, kiu subtenis mian esploreton per disponigo de la revuaj kajeroj kaj poste per aparte petitaj kopioj.

[8] Tiun ĉi folion mi dankas al *Herbert Mayer*, direktoro de IEMW.



1a Jaro Januaro 1904 No 1a

# Internacia Scienca Revuo

MONATA ORGANO

EN

ESPERANTO

*Eldonata kun alta patronado de*

*Doktoro* L. L. ZAMENHOF, autoro de la lingvo Esperanto; LA FRANCA SOCIETO DE FIZIKO; LA INTERNACIA SOCIETO DE ELEKTRISTOJ; *Profesoroj* ADELSKÖLD, APPELL, D'ARSONVAL, BAUDOIN DE COURTENAY, BECQUEREL, BERTHELOT, BOUCHARD, DESLANDRES, DUCLAUX, FÖRSTER, HALLER, HENRIKO POINCARÉ, RAMSAY, Generalo SEBERT: kaj diverslandaj scienculoj.

| *Redakcio :* | *Administracio :* |
|---|---|
| P. FRUICTIER | HACHETTE & Ko |
| 27, boulevard Arago, PARIS | 79, boulevard Saint-Germain, PARIS |

*ANGLUJO.* — « Review of Reviews », London.
*DANUJO.* — A.-F. Höst & Sön, Kjobenhavn.
*FRANCUJO.* — Hachette et Cie, Paris.
*GERMANUJO.* — Möller & Borel, Berlin.
*HISPANUJO.* — J. Espasa, Barcelona.
*HUNGARUJO.* — Lengyel Pál, Szekszárd.
*ITALUJO.* — Raffaello Giusti, Livorno.
*RUSUJO.* — M. Arct, Warszawa.

*Jara abono :* Francujo : 6 fr. 50; Por ceteraj landoj : 7 fr.
*Unu numero :* 60 centimoj : 25 kopekoj : 50 pfenigoj : 6 pencoj.

Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo kaj Rusujo.

Sur la dua kovrilpaĝo ripetiĝas la brila "PATRONARO", sed nun aldoniĝas la koncernaj Akademioj, Universitatoj kaj sciencaj institutoj – evidente temas pri elita elekto el la tiama eŭropa sciencistaro.

Sekvas „LINGVA KAJ SCIENCA ESTRARO (en formado)", kiu listigas 44 sciencistojn, medicinistojn, instruistojn kaj aliajn intelektulojn, ĉefe francojn, sed ankaŭ alilandajn (memkompreneble nur virojn!). Entute do esperiga komenco: Aro da kompetentaj, altrangaj specialistoj, konvinkitaj pri la baldaŭa venko de Esperanto en la Sciencoj kaj pretaj kontribui al la kreado de la faka lingvo per verkado kaj tradukado de fakaj artikoloj.

Dum la unuaj tri jaroj la revua celo estas: krei, kolekti, ordigi fakajn vortojn.

La kovrilpaĝo de "Januaro 1907" informas, ke "Administracio kaj Redakcio" translokiĝis de Parizo al Ĝenevo kaj "Direktoro" nun estas *René de Saussure*.

Pli ol tio gravas la enhavaj ŝanĝoj, pri kiuj informas la Antaŭparolo sur paĝo 1:

> „AL NIA LEGANTARO
>
> Internacia Scienca Revuo hodiaŭ eniras sub novaj aŭspicoj sian kvaran jaron de ekzistado.
>
> ... Tiuj ŝanĝoj estas la natura konsekvenco de la dua Universala Kongreso de Esperanto. Efektive, dum la Ĝeneva Kongreso, Esperanto iel oficiale ekaperis en la sciencularon; unuafoje, kelkaj sciencistoj kaj sciencamantoj kunvenis por **prepari** la fundamentan organizadon de Interncia Scienca Asocio, **kies celo estos la enkonduko de** la uzado de **Esperanto en la sciencularon**, en la sciencajn revuojn kaj internaciajn kongresojn.
>
> Kvankam tiu unua oficiala kunveno de scienculoj esperantistaj estis tre modesta, ĉu pri la nombro de la ĉeestantoj, ĉu pri la malvasteco de la kunvenejo, tamen ĝi estis la komenco de movado, kiu, en la estonteco, pli kaj pli disvastiĝados." (9)

Tiuj vortoj donas la impreson de unuanimeco inter la partoprenantoj de la aranĝo. Sed tiel ne estis, evidente.

[9] Grasaj elstarigoj de la aŭtorino



Jen komenco de la protokolo de tiu ĉi historia kunveno, kiu okazis la 31-an de aŭgusto 1906 kaj elektis prezidanto Generalon *Sébert*. En ĝi ni legas, ke oni diskutis pri **du proponoj**... (vd. paĝon 124).

*Carlo Bourlet*, profesoro ĉe la Konservatorio de l' Artoj kaj Metioj en Parizo kaj sekretario de la kunveno, opinias, ke antaŭ ĉio oni devas intensigi la klopodojn pri enkonduko de Esperanto en la sciencon kaj proponas "Deklaracion", per kiu la subskribontoj postulas, ke:

> "1ᵉ La scienculoj konstante uzu la lingvon Esperanto en siaj kongresoj.
>
> 2ᵉ La gravaj internacie disvastigitaj sciencaj gazetoj akceptu artikolojn redaktitajn en Esperanto kaj plie aldonu, al ĉiu artikolo redaktita en nacia lingvo, resumon en Esperanto montrantan ĝian enhavon."

Plej gravan komenton al tio havas matematikisto el *Harvard*-Universitato:

> "S-ro Prof. *Huntington* diras, ke li volonte subskribos la *duan* parton de la Deklaracio, sed ke li nuntempe ne ankoraŭ subskribos la unuan, kiun li konsideras kiel tro frua. Li do proponas, ke oni disigu la du partojn de la Deklaracio por ke ĉiu povu laŭvole subskribi nur unu el la du partoj de la Deklaracio."

Nun sekvas miraĵo:

> "La kunvenantaro unuanime **konsentas** la proponon de s-ro *Huntington*. Ĉiuj ĉeestantoj **subskribas la du partojn** de la Deklaracio, escepte s-ro Prof. *Huntington*, kiu subskribas nur la duan." (9)

La dua propono venas de *Harold Tarry*, "Meteorologiisto" (tiel!), kiu estis iniciatinta la kunvenon, nome

> "ke oni tuj fondu ian Esperantistan Sciencan Societon aŭ almenaŭ ian konstantan Sciencan Sekcion en la kongresoj."

Per tio li esprimas saman ideon kiel *René de Saussure*, sed

> "S-ro G-alo *Sébert* respondas, ke tiu fondo estas certe tre necesa, sed ĝia tuja aranĝo estas iom tro frua."
> Post diskutado ... S-ro *Tarry* ... reprenas sian proponon. Tamen ... la ĉeestantoj unuanime decidas:
>
> "1ᵉ ke Scienca Sekcio sendependa de la Kongreso ... estas *principe* fondita;
>
> 2ᵉ ke nenia regularo aŭ tuja aranĝo estos farita; kaj ke simple ĝis la venonta kunveno la supre citita Deklaracio taŭgos kiel rimedo por aligi scienculojn al la sekcio;

Jen, pri tiu kunveno, la teksto de la protokolo, redaktita de la eminenta sekretario C. Bourlet:

### Protokolo de l'Kunveno de Scienculoj

(Sciencistoj kaj Sciencamantoj)

Okazinta dum la dua Universala Kongreso de Esperanto
Ĝenevo, 1906.

Laŭ la propono de S-ro Tarry, kelkaj kongresanoj kunvenis la 31an de Aŭgusto en unu el la ĉambroj de la Komerca Lernejo por interparoli pri la rimedoj uzeblaj por akceli la enkondukon de Esperanto en la Sciencon.

Ĉeestis :

S-roj L. Borson, farmaciisto, Château-Thierry (Francujo).
Carlo Bourlet, Prof. ĉe la Konservatorio de l'Artoj kaj Metioj, Parizo (Francujo).
Th. Flournoy, Prof. de Psikologio ĉe la Ĝeneva Universitato, Ĝenevo (Svisujo).
Julius Hanauer, Inĝeniero-ĥemiisto, Frankfurt a/M (Germanujo).
Ed. V. Huntington, Prof. de Matematiko ĉe la Harvarda Universitato, Boston, Mass. (U. Ŝ. A.)
Ed. Mallet, Foto-ĥemiisto, Lausanne (Svisujo).
M. Monod, Studento, Ĝenevo (Svisujo).
W. W. Padfield, Inĝeniero, Ipswich (Granda Britujo).
Th. Renard, Ĥemiisto, Ĝenevo (Svisujo).
C. Rousseau, Farmaciisto (Francujo).
R. de Saussure, Matematikisto, Pt-Dto ĉe la Ĝeneva Universitato, Ĝenevo (Svisujo).
Generalo H. Sebert, Membro de l'Franca Akademio de la Sciencoj, Parizo (Francujo).
Harold Tarry, Meteorologiisto, Alger (Francujo).

La ĉeestantoj elektis :

Kiel Prezidanton de la kunveno, S-ron G-alon Sebert, kaj kiel Sekretarion S-ron Carlo Bourlet.

G-alo Sebert, dankinte la kunvenantojn pro la elekto, sciigas, ke li ricevis du proponojn : la unuan de S-ro Tarry, la duan de S-ro Bourlet. Oni decidas aŭdi unue la proponon de S-ro Bourlet.

S-ro Bourlet diras, ke ŝajnas al li antaŭ ĉio, ke oni devas klopodi por pliigi la skriban kaj buŝan uzadon de Esperanto en la Scienca mondo. Por tio, oni nepre devas kunigi ĉiujn fortojn de l'esperantistaj scienculoj (sciencistoj kaj sciencamantoj) por altrudi tiun uzadon al la sciencaj kongresoj kaj al la sciencaj gazetoj. Jam kelkaj pli-malpli gravaj faktoj en tiu direkto okazis.



> 3e ke provizore G-alo *Sébert* kaj D-ro *Bourlet* … serĉos rimedojn … por kiel eble plej baldaŭ efektivigi … kaj faciligi la definitivan organizon de la Scienca Sekcio."

Post tiu protokolo la redakcio de I.S.R. resumas:

> "Tiel, post tiu memorinda kunveno, la Esperantista Scienca Asocio estis **principe fondita**; … la **definitiva fondiĝo** de la ascoio estis prokrastata ĝis la venonta Universala Kongreso de Esperanto, t.e. ĝis la monato Aŭgusto 1907." (9)

De nun (ekde paĝo 62 de la januara kajero 1907) en ĉiu kajero de I.S.R. troviĝas „OFICIALA INFORMILO" de la scienca asocio (kiu evidente ankoraŭ eksperimentas pri sia nomo):

En junio 1907 (sur p. 229) ni legas pri "Ĝeneralaj kunvenoj por la definitiva fondo de la « Scienca Asocio Esperantista » " (tiel – inter francaj citiloj!),

– en julio (p. 276) pri "Projekto de regularo por la Esperantista Asocio" (sen citiloj), du paĝojn poste (p. 278) pri „Parolantoj kaj temoj enskribitaj ĝis nun por la kunvenoj de I.S.A.E. en Kembridĝo" kaj

– en septembro (p. 341) troviĝas "Raporto pri la fondo kaj la kunsidoj de la I.S.A.E. dum la 3-a universala Kongreso de Esperanto en Kembridĝo (Angl.)".

En la decembra numero (p. 415) legeblas iom nerekta konfirmo pri tiu ĉi fondo fare de "La Kasisto de la I.S.A.E., *Th. Renard*", en sia

> "Raporto pri la financa situacio de l' Internacia Scienca Asocio Esperantista 1906-1907. –
>
> Komisiita de la Komitato de l' I.S.A.E. prezenti raporton pri la budĝeto de la provizora Asocio fondita en Ĝenevo okaze de la Dua Kongreso, mi studis la diversajn necesajn dokumentojn pruntitajn al mi de la Ĝeneva Oficejo, kaj mi starigis la sumojn de l' elspezoj kaj de l' enspezoj, haltante je l' **15a de Aŭgusto, dato de la definitiva fondiĝo** de l' Asocio en *Cambridge*." (9)

Iom pli detalan priskribon de la solena evento donas "Esperantista Dokumentaro" el la jaro 1908 (10), en ĉapitro pri "Scienca Asocio":

(10) Esperantista Centra Oficejo: Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Kajero Sesa (Januaro 1908). Oficiala Parto, Sekcio A: Kongresoj. TRIA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (*Cambridge*, 12an-17an de Aŭgusto 1907; Paris, Esperantista Centra Oficejo, 51, *Rue de Clichy*, (p.134)

"La Esperantista Scienca Asocio kunvenis por sia oficiala fondo Ĵaŭdon Aŭgusto 15an posttagmeze je la 1½ horo en la aŭdejo de la «*Union Society*». Prezidis la provizora prezidanto G-alo *Sébert*, membro de l' Franca Instituto. La nombro de la anoj de la Asocio hodiaŭ estas ĉirkaŭ 700, el kiuj almenaŭ 60 ĉeestis la kunvenon, krom la publiko nesciencula aŭ neesperantista. D-ro *Zamenhof* ĉeestis kiel honora prezidanto de la Asocio."

Per tio ni vidas pli klare:

En 1904 (kiam Esperanto aĝis 17 jarojn kaj 1½ jaroj antaŭ la unua Universala Kongreso) ekaperis INTERNACIA SCIENCA REVUO, kies ĉefa celo estis konscia evoluigado de la faka terminaro.

Samtempe ĝi preparis la estiĝon de organizaĵo, kies prioritato estus la disvastigado de Esperanto en la Sciencoj.

Tiucela kunveno okazis 1906 (31.08.) dum la dua UK en Ĝenevo. Ĉar tie oni diskutis bazajn problemojn kaj decidis principe pri la asociiĝo, tiu dato por multaj eminentaj sciencistoj, kiel ekz. *Paul Neergaard*, validas kiel fondiĝo proprasence. Tamen, la oficiala, formala, solena akto, en ĉeesto de *Zamenhof*, okazis nur unu jaron poste, en Kembriĝo, la 15-an de aŭgusto 1907.

Tiel Internacia Scienca Asocio Esperantista havas du naskiĝdatojn.

**Adreso de la aŭtorino**

*S-ino Wera* BLANKE
*Otto-Nagel-Str. 110*
*DE – 12683 B e r l i n*
GERMANIO

<wera.blanke@snafu.de>

**Priaŭtora informo**

La aŭtorino naskiĝis 1933 en *Leipzig* kaj nun vivas en *Berlin*. Dum la 1980-aj jaroj ŝi iniciatis la Terminologian Esperanto-Centron de UEA (TEC). Ŝi multe publikigis pri la rilatoj inter Esperanto kaj la evoluo de terminologio-scienco kaj pri terminologia laboro en Esperanto. En la jaro 2006 ŝi ricevis la specialan premion *"Eugen Wüster"*.





# La ŝanĝiĝanta interrilato scienco-socio: koncernoj por ISAE en la 21-a jarcento

*José Antonio* VERGARA

## 1. Enkonduko: la paralelaj mondoj de ISAE 1906 – 2006

Evidente, okazis plurdimensiaj, diversaj kaj enorme gravaj ŝanĝoj kaj en la scienco kaj en la fenomeno Esperanto ekde la fondiĝo de nia Internacia Scienca Asocio Esperantista, la 30-an de aŭgusto 1906, unue kiel preparkomitato, rezulte de faka kunsido de "kelkaj scienculoj kaj sciencamantoj" dum la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, laŭ propono de *H.Tarry*, sub la gvido de la gravaj pioniroj *Hyppolite Sébert*, *Carlo Bourlet* kaj, iom pli poste, *René de Saussure* (*Privat* 1927:41, 160; *Bleier & Cense* 1937:153; *Adam* 1979:126).

Ĝuste ĉar ISAE koincide naskiĝis en la sekva jaro post kiam okazis tio kio estos poste agnoskita kiel decida mejloŝtono en la scienca kaj Esperanta historioj, nome la ejnŝtejna revolucio kaj unua UK, respektive, oni povas skize ekzameni la sorton kaj evoluon de ambaŭ sferoj dum la 100-jara periodo startinta per tiuj du faktoj.

Kiel sciate, tra la mondo oni festis plej diverse kaj amase la pasintjaran jubileon de la teorio pri speciala relativeco kaj la hipotezo pri lumokvantumo, lanĉitaj de *Einstein* en 1905. Tial ke la esperantofonoj emas esperi ian estontan agnoskon por sia lingvo, menciindas ĉi tie ke tiam ne okazis tuja alpreno de tiuj unuaj kontribuaĵoj kadre de la Fiziko, kaj eĉ pasis ses jaroj ĝis la apero de libro pri la unua el ili (*Das Relativitätsprinzip* de *Max von Laue*, 1911), dum la ideoj de *Einstein* pri kvantumfiziko restis neatentitaj ankoraŭ dum jaroj, kiel konfesis *R.A.Millikan* je la akcepto de la *Nobel*-premio en 1923 (*Holton* 1998:168). Tamen, la posta historio ja estas tute alia, kiel sciate, kaj ekzemple la spuroj de tiu homara geniulo kerne troviĝas ne nur en la komuna idea bildaro de nia specio, sed ankaŭ en ĉiutagaj realaĵoj per la rekta aŭ nerekta enkonduko de liaj eltrovaĵoj en multajn teĥnologiajn procedojn kaj ilojn kutimajn en la nuno.